ALVOKO POR LA MARŜO KONTRAÙ LA ATOMARMILOJ

Okazonta la 15an de marto, je la 14a h., Place Frans Hals en Anderlecht.

Estimata Samidean(in)o,

Pli kaj pli da homoj ekkonscias pri la netaksebla mortig kaj detrukapablo de la atomarmiloj. Kiam Hiroŝimo estis detruita, la tuta homaro troviĝis antaù dilemo : Ĉu sama sorto atendas nin aù ĉu iel tia amasmurdilo malaperos ?

Pro novaj eltrovoj, hodiaù oni kapablas konstrui bombojn miloble pli efikaj ol tiuj uzitaj en Japanio. La bombnombro disponebla kapablas mortigi oblan nombron de la nuna vivantaro sur nia terglobo.

SUFIĈAS !!

La minacatoj ribelas. Miloj kaj miloj da voĉoj krias proteston. La eminentulo kiel la laboristo esprimas saman postulon : Ni volas vivi! Niaj edzinoj volas vivi! Niaj infanoj volas vivi! Internaciaj movadoj, arigantaj adeptojn de ĉiaj partioj kaj religioj, kreiĝis por kunordigi la organizadon de pli kaj pli ampleksiĝanta homamaso kiu, kiel ondego, fine trafos la celon.

Nia esperantista samideanaro sekvis saman vojon kaj antaù dek jaroj estis starigita la bazon de la Mondpaca Esperantista Movado (M.E.M.) al kiu ĉiu esperantis(in)o povas aliĝi. El pluraj landoj, de ekstremokcidento ĝis ekstremoriento, miloj el la gesamideanoj, aprobante la celon, jam enviciĝis.

Unuafoje, ili estos reprezentataj en Belgio kaj banderolo esprimos ilian proteston dum la Marŝo kontraù la atomarmiloj. Trans la landlimoj, vin strecante la manon, ili faras al vi alvokojn inter kiuj la plej gravan :

> Gesamideanoj, respondu al la iniciato de la belga junularo, partoprenante la Marŝon kontraù la nukleaj armiloj !
> Vi ne restu surdaj al antaùaj alvokoj kaj, portante la verdstelan insignon, vi sekvu la esperantistan banderolon kiu plej bone vin konvenas.

J. COEN
Peranto de M.E.M. por Belgio.

Aliĝu al M.E.M.! Jara kotizo, la abono al ĝia organo "PACO" enkalkulita, 50 fr., pagenda al p.ĉ.k. 2210.99 de J. Coen, 9, rue Arthur Roland, Bruxelles 3.